

Milito kaj paco laŭ Hector Hodler

Pri la artikolaro *Novaj vojoj. La pacproblemo* publikigita en la gazeto *Esperanto* (1915-1917)

De Andreas Künzli

En esperantistaj medioj, Hector Hodler (1887-1920) estas konata figuro precipe lige kun la unuaj jaroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĝenevo, kiel redaktoro-eldonanto de ĝia revuo *Esperanto*, malpli kiel filo de la renoma svisa pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918) kaj ankoraŭ malpli kiel verkisto de studoj pri la pacproblemo. Liaj vivojaroj kongruis kun la tempo de la Balkanaj Militoj (1912-1913) kaj precipe de la Unua Mondmilito (1914-1918).¹ Hector Hodler multe meditis pri la kaŭzoj de la militoj kaj pripensis, el la vidpunkto de la internacia juro, kiaj kondiĉoj estus necesaj por atingi veran internaciajn pacon kaj funkciantan juron. Ĝuste en la menciita revuo *Esperanto* (UEA) li aperigis, sub la titolo *Novaj vojoj. La pacproblemo*, siajn modelajn artikolojn ĉi-temajn, kaj per tio li prezentis sin al la publiko kiel engaĝita homo, kiu profunde okupiĝis pri la pacproblemoj de sia epoko.² Analizante la temon el la vidpunkto de la humanismo kaj internacia juro, Hodler celis pruvi, ke li estas sperta fakulo sur tiu tereno, kvankam ne profesie, kaj ke la lingvo kaj movado Esperanto estas intime ligitaj kun la pacproblemo. Tiun ĉi konvinkon Hodler esprimis per unu el siaj frazoj, kiuj klare montru la ligon inter la esperantismo kaj la pacproblemo: *Esperanto certe plifaciligos la interpopolajn rilatojn kaj ebligos iom post iom la formiĝon de supernacia kulturo. Sed krom tio ke tiu grandega tasko estos tre longedaŭra, ĝi estas realigebla nur se la politikaj internaciaj kondiĉoj ne malhelpas ĝin starigante ĉiuspecajn barojn inter la popoloj kaj eternigante la plej krudajn antaŭjuĝojn.* Sed unue sekvos informoj pri la historio de la unua mondmilito (1914-1918), dum kiu la artikola serio de Hodler ekestis.

Pri la genezo de la Unua Mondmilito

La espero de la fruaj naciaj movadoj de la 19a jarcento, ke la kontentigo de la naciaj unuecigaj kaj sendependigaj deziroj kondukos al epoko de paco, ne

plenumiĝis. Anstataŭ tio la malnovaj kaj novaj naciŝtatoj kunpuŝiĝis en la lasta triono de la 19a jarcento en nacia rivaleco kaj ekonomia konkurenco. La konservado de la naciaj interesoj fariĝis sanktaj sloganoj de la ekstera politiko de tiuj ŝtatoj. La naciaj egoismo kaj ŝovinismo forpuŝis la konscion pri internacia solidareco. Tradiciaj malamoj estis revivigitaj, naciaj antaŭjuĝoj kaj reciprokaj ofendoj fariĝis popularaj, servante al la celo malaltigi la aliajn kaj glorigi sin mem: germanoj kontraŭ francoj, poloj kontraŭ rusoj, italoj kontraŭ aŭstroj ktp. La najbara popolo estis skeptike rigardata kiel la malamiko de morgaŭ. De la aliaj Francujo estis kondamnita kiel senmorala nacio, dum Francujo vidis sin mem kiel la kulminon de la kulturo, civilizo kaj racio; rusojn oni abomenis kiel tatarojn, dum la rusoj mem fieregis pri la profundeco de sia legendeca slava animo; en germano estis vidata la agresema kruckavaliro, kiu perforte konkeras aliajn, sed Germanujo mem pretendis esti respektata kiel la popolo de la poetoj kaj filozofoj. La ielajna endanĝerigo de la propra patrio estis konsiderata kiel plej akra sakrilegio. En tia etoso perfekte ĝermis kaj prosperis la ŝovinismo, la rasismo, la antisemitismo, la imperiismo.

Interkrampe ni memoru la epizodon dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, kie L. L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, publike eldiris ĝuste la kvazaŭ herezan inverson de la tiam modaj sloganoj: *En Boulogne-sur-Mer kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...* La naciismo evoluis al fiksa ideologio, kiu rifuzis ke oni rezignu ĉiupreze pri la ekzistanta ordo. Tiel la naciismo, kiu en siaj komencoj sendube estis pozitiva forto, kiu helpas la emancipiĝon de diversaj popoloj en Eŭropo, alprenis pli kaj pli agresemajn, nedemokratajn trajtojn. Ĝi bone helpis la konservativecon de la internpolitikaj cirkonstancoj kaj tiel konformis al la interesoj de la regantaj klasoj.

Ĉi tiu naciismo-ŝovinismo kondukis rekte al plia ŝtupo - al la militismo, militemo aŭ militamo. La forta akcentado de la preteco, ja eĉ entuziasmo al milito kaj batalo kiel integra parto de la propagando de la nacia perforto-ŝtato, kondukis al la militeca etoso de la tuta vivo. Komenciĝis fervora armado-konkurenco, kiu rapide gajnis propran dinamikon. La postuloj pri la propra sekureco fariĝis pli kaj pli grandaj, sed samtempe fortiĝis ankaŭ la milita psiĥozo. Fatalisma jesado pri la milito kaj paniko antaŭ la milito fariĝis simbiozo timiga. La kulmino de tiu militisma strebado estis atingita en la imperiismo, kiam la internaciaj kontraŭdiroj akriĝis. Imperiismon aplikis ĉiuj pli grandaj ŝtatoj, ĉar ĝi vastigis la influon de iu ŝtato translime al alia ŝtato, ĉu en formo de koloniismo aŭ pere de la ekonomia potenco. Tiu politiko havis kelkajn konkretajn motivojn kiel la deziron investi la propran monkapitalon en landoj kun pli da ekonomiaj perspektivoj, la sekurigon de la ekspluato de novaj krudmaterialoj, la malfermon de novaj merkatoj, la intenco solvi la sociajn kaj

ekonomiajn krizojn pere de novaj laborlokoj alilande, la sekurigon de pozicioj en la lukto je pli da politika influo en la mondo, la kontentigon de la sento venki kiel supera lando pri malsuperaj popoloj, k.a.³

Komplikaj interŝtataj konstelacioj

Antaŭ la eksplodo de la unua mondmilito la konstelacio en la koncerto de la potencoj estis jena: Germanoj kaj francoj malamikis pro Alzaco, rusoj kaj aŭstroj rivalis pro Balkanio, aŭstroj kaj italoj kverelis pro Trentino. Dum la germana-aŭstra amikeco ekzistis de post 1879, la bonaj rilatoj inter germanoj kaj rusoj disfalis post la forpaso de Bismarck, ĉar liaj posteuloj kredis, ke tiuj rilatoj ne estas kongruaj kun la partnereco kun Aŭstrujo. Francujo profitis tiujn malboniĝintajn rilatojn kaj alservis sin mem per mono kaj armeaj rimedoj al la Cara Imperio. La perspektivojn de la bonrilatoj kun Anglio la germana diplomatio maltrafis, en la falsa kredo, ke Anglio estu ĉiukaze dependa de la ligo kun Germanujo. Intertempe la angloj aranĝis sin kun Francujo en Egiptio kaj Sudano kaj kun Ruslando en Persio. Finfine Britujo, Francujo kaj Ruslando forĝis sian aliancon, dum Germanujo fidis je Aŭstrujo, kvankam la Habsburga ŝtato troviĝis en labila stato. Ankaŭ la dua aliancpartnero, Italio, estis malfidinda, pro ĝiaj ambicioj je Sud-Tirola. Sekve, en Germanujo do kreskis la sento, ke oni estis ĉirkaŭata de malamikaj potencoj, kaj la kreskanta forto de Ruslando kaŭzis apartajn angorojn. La germana politiko fariĝis pli kaj pli agresema.

La murdo al la aŭstra imperiestrido kaj de ties edzino en Sarajevo la 28an de junio 1914 fare de serba teroristo el Bosnio akriĝis la politikan krizon de tiu tempo kaj akcelis la militemon. Unu monaton poste Aŭstrujo-Hungario proklamis la militon kontraŭ Serbujo, kiu estis apogita de Ruslando. Post la germana militproklamo kontraŭ Ruslando, la unua mondmilito estis lanĉita kaj gvidita inter la Germana Regno, Aŭstrujo-Hungario unuflanke kaj Francujo, Britujo kaj Ruslando aliflanke. Tiu milito atingis ankaŭ Malproksiman Orienton, Afrikon kaj Orient-Azion.

En tiu unua moderna internacia amasbuĉado, en kiu oni ne hezitis disŝpruci ankaŭ venengason, pereis deko da milionoj da homoj, kaj pli ol 20 milionoj da homoj estis vunditaj, ĝiaj kostoj superis unu billionon da oraj markoj, kio egalas al pli ol la tuto de la ekonomia potenco de la eŭropaj landoj. La milito estis financata pere de monpruntoj kaj fariĝis la rimedo de la inflacio.

Kiel kelkaj historiistoj emfazis, la milito eksplodis, ĉar precipe en politikistaj kaj intelektulaj rondoj regis militentuziasmo en la kredo, ke la milito povas solvi la naciajn antagonismojn inter diversaj regantaj dinastioj kaj la

problemojn de la socio, kiu laŭ kelkaj teoriistoj estis dekadenta (Hector Hodler aludis ĉi temon en sia artikolo *Milito kaj homa energio*). Propagando (kun ksenofobiaj kaj antisemitismaj sonoj) por influi la popolamasojn de la propraj landoj kaj aligi ilin al la militentuziasmo ludis gravan rolon. Tamen kontestata estas en la historiografio ĝis kiu grado tiuj popolamasoj deziris aliĝi al la eŭforio. De jaroj regis en Eŭropo naciismaj emocioj kaj ŝovinismaj timigoj, kiuj kreis politikan klimaton, en kiu eĉ la sobroloj malsobriĝis. De multaj samtempoj la eksplodo de la milito estis sentata kiel speco de liberigo de granda premo. Bedaŭrinde la pacamaj fortoj konfuziĝis, tiel ke ili ne sukcesis eviti la negativan evoluon. Male, la laboristoj mem partoprenis la militon por defendi sian patrujon. Protesti kontraŭ la milito do ne havis sencon. Kiam ekzemple la 1an de majo 1916 Karl Liebknecht publike elpaŝis kadre de kontraŭmilita demonstracio kun plurmil milit-protestantoj en Berlino, li estis arestita kaj kondamnita pro ŝtatperfido.

La milito estis konkludita pere de pluraj packontraktoj: la serio komenciĝis en januaro 1919 per la Pariza Packonferenco, en junio la germanoj devis subskribi la kontrakton de Versailles, en septembro la aliancanoj kaj Aŭstrujo subskribis la kontrakton de Saint-Germain. La kontrakto de Neuilly kun Bulgario sekvis en septembro kaj kun Hungario en junio 1920 en Trianon. La plej lasta kontrakto estis subskribita kun Turkujo en Sèvres. La 10an de januaro 1920 la novfondita Ligo de Nacioj kun sidejo en Ĝenevo komencis sian laboron kaj funkciadis ĝis 1946. Inter 1921 kaj 1927 efektiviĝis en Leipzig entute 17 juĝprocesoj kontraŭ militkrimuloj de la unua mondmilito. Dum la Vejmara Respubliko okazis publika debato pri la militkulpo. La doktrino de Woodrow Wilson pri la suvereneco de la popoloj komencis ludi signifan rolon.⁴

De Gaulle konstatis, ke ekzistis venkintoj kaj perdintoj, sed ke ni ĉiuj estas perdantoj. Do, la katastrofo de la unua mondmilito estis la logika konsekvenco de la naciismo, imperiismo kaj militismo. Eblas diri, ke kun ĝi la 19a jarcento definitive konkludiĝis, sed ankaŭ la domineco de Eŭropo kaj la kredindeco de la absolutismaj monarkioj finiĝis.

La artikolaro de Hector Hodler

La artikolaro de Hector Hodler ampleksas la tekstojn sub la titolo *Novaj vojoj. La pacproblemo*, kiu aperis en la revuo *Esperanto* de Universala Esperanto-Asocio (UEA) de la 5a de julio 1915 ĝis la 5a de februaro 1917. Tiun ĉi tekstaron antaŭis la artikolo *Milito kaj homa energio*, kiu aperis en *Esperanto* (n-ro 178 de la 5a de junio 1915). En sia kontribuaĵo Hodler traktis la temon de la giganta energio, kiun elspezas ĉiu unuopulo, kiu iel ajn partoprenas en la

milito, ĉu kiel persono defendanta ideon, ĉu kiel simpla soldato, ĉu kiel lia hejme restinta edzino, ktp. Finfine, Hodler kredis, ke tiu energio estas malŝparegata kaj direktata ne nur kontraŭ la interesoj de la homaro, sed ankaŭ kontraŭ la individuo mem.

En la artikola serio pri *Novaj vojoj. La pacproblemo* estas tuŝita po unu temo, kiun Hodler analizis, kritikis kaj konkludis. Tiel 18 inter si koheraj partoj formas kune unu tuton, kiun oni povus difini kiel *Manifesto de la pacifistoj* el la vidpunkto de la internacia juro, verkita de konvinkita mondfederalisto, kiu praktikis Esperanton.

Jam enkonduke al tiu artikola serio Hodler postulis la starigon de internacia paca ordo, kiu laŭ li forigus la malamon inter la popoloj por elimini la kaŭzojn de la milito. Trakti la militproblemon estus sufiĉe malfacila tasko, skribis Hodler, ĉar necesus okupiĝi pri la plej diversaj interesoj kaj vidpunktoj, ekzemple pri la kontraŭdiro, ke kelkaj opinias, ke milito estas necesa, justa kaj nobla, ĉar laŭ ili ĝi progresigus la civilizon, kaj aliaj, kiuj estas konvinkitaj, ke ĝi estas malbona kaj nedezirinda.

En la dua artikolo Hodler celis repliki la hipotezon, ke la milito havas ĉefe ekonomiajn kaŭzojn kaj ke la kapitalistaj rondoj ĝin lanĉas. Laŭ Hodler ĉi tiu problemo havas precipe politikan kaj juran karakteron. Kvankam la ekonomia motivo sendube devas esti kunkonsiderata, Hodler pli adeptis al la teorio, ke la kaŭzoj de la militoj estas serĉendaj pli sur la socia, kultura kaj politika kampoj, kiel laŭ li pruvis la Balkanaj Militoj. Pro tio necesus pledi por profunda aŭ radikala reformo de nia socia organizeco. Savi la civilizon estus la unua devo, poste necesus ĝin plibonigi. La virina voĉdonrajto kaj la lingvo Esperanto povus esti signifaj kontribuoj al la malfaciligado de la milito. Unuavice la tolerado inter diversgentaj kulturformoj pli firmigus la novan pacordon, kaj la formado de interŝtata ligo, kiu reguligus la interŝtatajn rilatojn, esence helpus la internaciemajn kulturceladojn.

La tria artikolo de Hodler traktis la arbitracian procedon, kiu laŭ Hodler estas la kerno de la pacifista doktrino kaj per kiu internaciaj konfliktoj povus esti solvitaj. Ĉi tiu procedo devus esti enkondukita de la paci(fi)stoj mem. Arbitracio estas la juĝo pri malkonsento far tria persono elektita de la kontraŭuloj, kiam senpera traktado ne eblas. Hodler klarigis, ke en la ĝisnuna internacijura praktiko la arbitracia procedo estis aplikita en la kazo de neĉefgravaj demandoj, kaj ke ĝi helpas solvi konfliktojn precipe nepolitikajn. Tamen Hodler opiniis, ke necesus funkciigi la arbitracian principon ankaŭ sur la nivelo de la politikaj demandoj.

En la kvara artikolo Hodler okupiĝis, laŭ konkretaj teoriaj ekzemploj, pri la kontraŭdira demando rilate la unugentan aŭ plurgentan ŝtaton, pri la manko de la aŭtoritateco de la arbitracia juĝo en la pozitiva internacia juro, kiu konsistas

el komune akceptita principaro pri la interŝtataj rilatoj. Krome li analizis la demandojn de la sankciado, de la utiligeblo de la kolonioj kaj de la enmiksiĝo de unu ŝtato en la alian. Kaj li venis al la konkludo, *ke la arbitraco, kiel oni ĝin proponis ĝis nun, t.e. sen jura fundamento kaj sen trudrimedoj, estas nekapabla solvi la malkonsentojn, el kiuj devenas la modernaj militoj*. Al tiuj trudrimedoj apartenu laŭ Hodler ankaŭ internacia federigita armeo. Samtempe Hodler bedaŭris, ke ĝis nun ne estis faritaj grandaj paŝoj antaŭen por solvi la arbitracian demandon.

La kvina artikolo estas dediĉita al la kaŭzoj kaj sekvoj de la aneksado de fremda teritorio. Ĝi povas okazi, se iu popolo sentas sin pli supera al la alia, aŭ pro ekonomiaj kaj politikaj kialoj, aŭ simple pro prestiĝo. Necesus do pruvi la malutilon de la konkeremo; por la progresigo de la civilizaco estus pli oportune, se regus ordo kaj sekureco anstataŭ anarkio kaj ĥaoso.

Sub la kondiĉoj de la ordo kaj sekureco povus prosperi ankaŭ la popolrajtoj. Ankaŭ en ĉi tiu rilato la decidoj ne povas esti lasitaj al unuopaj ŝtatoj, sed devas esti submetitaj al internacia leĝopovo, kiu reprezentas la asocion de la civilizitaj nacioj, kiel Hodler postulis en sia sesa artikolo.

Hector Hodler komprenis, ke la malarmado same dependas de internacia konvencio, kaj li klarigis tion en la sepa parto. Tamen, kiam la ŝtatoj konsentos limigi sian armadon, estus necese, ke ili konfidu unu la alian. Do, *la demando pri la limigo de la armadoj dependus de la pli vasta problemo pri la transformo de la ideoj kaj kredoj, kiuj regas la tutmondan politikon*. Kaj la limigo de armadoj estus daŭra *nur tiom, kiom niaj spiritoj malarmos*.

Ŝajnas, ke Hector Hodler skeptike rilatis al la laboro de diplomatoj kaj burokratoj, kiujn li kritikis en la oka parto kiel *malgrandan klanon, kiu, malmulte kontrolata, ĝuanta privilegian situacion kaj vastan agadliberecon, nerezisteble tendencas konsideri la diplomation kiel celon, ne plu kiel rimedon*. Kaj: *La diplomatoj estas similaj al la profesiaj militistoj kaj al la pli multaj specialistoj. Allogate per la tekniko de sia laboro, ili ne plu perceptas ĝiajn ĝustajn rilatojn kun la aliaj partoj de la socia organismo kaj, pro manko de superrigardado, inklinas doni al ĝi troan gravecon*. Eĉ pli malbone Hodler trovis la indiferentecon de la popolamasoj rilate la grandajn problemojn de la monda politiko, kiu *havas la naturan efikon, ke ĝi ankoraŭ plie kreskigas la potencon de la diplomataj klasoj*. Same malbona estas la fakto, ke la *parlamentoj restas sen preciza informiĝo pri la enhavo de gravegaj kontraktoj, kiuj estas cetere ofte sekretaj*. Do, ankaŭ en ĉi tiu rilato, *nur transformiĝo de la internacia ŝtatsistemo, t.e. la starigo de interŝtata organizo (federacio) havus la neeviteblan efikon transformi la diplomation*.

Alia prioritato en la proponaro de la pacifistoj estus la komerca libereco, kiu devus etendiĝi inter la landaro de la starigota federacio. Ĉia formo de

protektismo estu malhelpata. Se tia ŝtatligo ekzistus, ĉesus ankaŭ la dependeco de la komerca politiko de la naciaj interesoj, kie *nekompetenta, rutinema kaj maldiligenta burokrataro povas facile malhelpi la ekonomian progresadon.*

Same li malkontentis pri la rolo de la gazetaro kaj de la ĵurnalistoj, al kiuj li riproĉis kvazaŭ cinikan sintenon (sen eksplicite mencii tiun ĉi terminon), kiel sentebblas en lia deka artikolo. Kaj li forte bedaŭris, ke la gazetaro fariĝis pli la ilo de la milito ol la ilo de la paco, ĉar ĝi estas, kun kelkaj esceptoj, unu el la instrumentoj de la politiko de la internacia anarkio, ĝi permesas *kalumniojn kontraŭ fremdaj nacioj, falsajn aŭ malĝuste prezentitajn informojn kaj senfundamentajn akuzojn.* Krome ili agas en la nomo de iu partio aŭ politika klano. En tia sistemo ĵurnalistoj nature ne povus esprimi sendependajn vidpunktojn.

La sola racia solvo de la problemoj pri la internacia ordo do konsistis en la starigo de ŝtatligo (federacio), skribis Hodler enkonduke al la dekunua ĉapitro, por difini la ideon de federacio jene: *La federacio estas, en sia esenco, politika asocio inter ŝtatoj, kiuj grupiĝas por reciproke garantii sian sekurecon kaj prizorgi siajn komunajn interesojn. Aliĝante al federacia sistemo, ŝtatoj forcedas siajn rajtojn de suvereneco pri certaj objektoj al la asocio, kiu interŝanĝe certigas al ĝi diversajn profitojn, kiujn nur ĝi volas doni. La fundamenta principo de la federacio estas jene formulebla: La ŝtatoj estas sendependaj tiom, kiom ilia sendependeco ne estas limigata de la federacia leĝaro.* Kvazaŭ revolucia estas la ideo pri forcedo de suvereneco al la federacio. La historio instruas, ke la federacioj el plensuverenaj ŝtatoj estis ĉiam ekstreme malfortaj, kiel Hodler atentigis en la dekdua artikolo, sed en anarkia sistemo la ŝtatoj estas senlime sendependaj. Kaj li forte bedaŭris, ke la grandega plimulto da homoj ankoraŭ konsideras la federacion mem kiel utopion.

En la sekvaj artikoloj Hodler skizis siajn imagojn kiel internacia pacorganizado (ŝtatligo, federacio) povus aŭ devus funkcii, nomante la organojn de tia instalaĵo. La ĉeftemo de la dekdua artikolo estas samtempe la demando pri la reprezentado de la ŝtatoj kaj la kompetenteco de la federacia Kongreso, kiu estus la esenca registara organo, do havus ne sole leĝofaran, sed ĝis iu grado ankaŭ leĝoplenuman povon, t.e ĝi posedus la superan gvidadon de la internaciaj aferoj; plifortigita la ŝtatunio estos, kiam ankaŭ plilarĝiĝos kaj plipreciziĝos la kompetenteco de la Kongreso. En la dektria artikolo sekvas la priskribo de la funkciado de la konstanta kongresa delegacio, formota per la delegitoj de la grandaj regnoj (unu po regno) kaj de kelkaj delegitoj el la aliaj regnoj, laŭ rondira vico. Flanke de tiu konstanta delegacio kaj sub ĝia senpera kontrolo ekzistus internacia administra oficejo aŭ kancelario, kiu plenumus administrajn laborojn. Por juĝi la jurajn konfliktojn, speciale tiujn pri la apliko aŭ interpreto de la internacia juro kaj interŝtataj traktatoj, sin trudos la kreo de internacia juĝa

Kortumo. En la sama artikolo Hodler traktis ankaŭ la rolon de la internacia armeo, kies celo estus garantiĝi la respekton de la juro kontraŭ ĉia atenco kaj certigi la eksteran sekurecon de la kunligitaj nacioj.

Kompreneble Hodler ne estis naiva kaj eĉ dubis pri la sukceso de la federacio. En la dekkvara artikolo, en kiu li traktis la problemon de la nacia misiemo kaj la danĝeron de la civiliza dekadenco, li skribis: *Cetere estas ĥimere kredi, ke la federacio malhelpos ĉian konkuradon inter la ŝtatoj. La nacioj ne plu batalados por sia ekzisto, sed ili ĉiam batalados por defendi sian vidpunkton kaj atingi certajn profitojn.* Kaj ĉio dependus de la individuoj vivantaj en tiu ŝtato: *La ŝtato prosperas, se la individuoj, el kiuj ĝi konsistas, estas laboremaj, ordemaj, ŝparemaj, bonmoraj. Ĝi malprosperas en la kontraŭa okazo.* Iuj eĉ asertus, ke federacio estus fakte neebla pro la tro profundaj diferencoj, kiuj apartigas la naciojn, do grupigi ilin en unu asocion estus vane, ĉar kontraŭnature. Hodler atentigis samtempe pri la alia flanko de la realeco - pri la maldiferencoj aŭ similecoj inter la nacioj: la nacioj havus multajn samajn interesojn, sed la problemoj de ilia prospero estas, ke la nacioj estas apartigitaj per multaj baroj.

En la dekkvina artikolo Hodler sin demandis, ĉu la civilizitaj ŝtatoj ne estus tro malsamaj rilate al sia kompreno de la juro kaj rilate al sia politika organizeco, tiel ke ilia unuiĝo estu realigebla por longa tempo. Sed li observis, ke la civilizitaj nacioj ne plu prezentis tian diversecon de konstitucio kaj ke pro la interdependeco de la ideoj kaj kredoj la ŝtatoj tendencus alproksimigi inter si la internan organizecon pli-malpli laŭ komunaj politikaj ĉefideoj. La leĝoj devenus ĉiukaze el ideoj kaj kredoj, kiuj preskaŭ ĉiam havas universalan karakteron. La primitivan formon de regado, en kiu la popolo estas nur ŝafaro, pri kies opinioj aŭ volo oni malmulte zorgas, li vidis jam malaperadi. Do, en tiu artikola parto trabilas nepretervideble la forta optimismo de Hodler pri la estonteco. Kompreneble Hitler kaj Stalin, la faŝismo kaj la diktaturoj en orienta Eŭropo de la intermilita tempo tiam neniel estis antaŭvideblaj, same kiel la finfine fatala evoluo de la Ligo de Nacioj kaj la starigo de la Unuiĝintaj Nacioj post la dua mondmilito, ĉi tiu plej nigra kulmino de la homaro, ne estis prognozeblaj.

Tamen la optimismo de Hector Hodler ĉiam denove ŝanceliĝis, kiam li skribis: *Ĉia grava ŝanĝo en la internaciaj rilatoj postulas antaŭ ĉio la transformon de la homa mentaleco; interpopola unuiĝo reprezentas novan politikan idealon.* Hodler klare ekkonis, ke interŝtata ordo estus gravega progreso kompare kun la nuna anarkio, kiel li akcentis en la deksesa parto de sia artikolaro, en kiu li skizis la metodojn de la starigo de tia federacio. Multaj homoj sentus, ke nenio en la naturo funde malhelpus ĝian stariĝon. Sed li trovis maloportuna la abismon *inter tiuj forflugemaj, malprecizaj, senordaj pensoj kaj*

la klara, forta, necedema konvinko, kiu estus necesa por triumfigi la federacian celadon. Tre malfacile estus do transformi tiujn teoriajn aprobojn en verajn kredojn kapablajn naski agojn. Li prilamentis la *pasivecon kaj spiritan miopecon de la popolamasoj* kaj la antaŭjuĝojn, kiujn li vidis ankoraŭ profunde enradikiĝintaj en la kapoj kaj koroj de la homoj kaj kiu devus esti forlasitaj.

Hodler ne hezitis kritiki la antaŭmilitan pacmovadon, kiu laŭ li ne multe atentis la neceson de la sistema reedukado de la publika opinio. Laŭ li la pacmovadanoj *dediĉis preskaŭ sian tutan agadon al klopodoj ĉe la registaraj rondoj kaj politikaj eminentuloj, kvazaŭ paca ordo povus esti starigata per dekreto, sen ia antaŭa ŝanĝo en niaj ideoj kaj pensmaniero.* La pacifismaj manifestadoj fariĝis laŭ li akademiaj kunvenoj sen vera influo ĉe la publiko, kiu reagis indiferente rilate al teoriaj diskutoj de juristoj kaj politikistoj. Aliflanke la pli granda parto de la politikistoj ne kredus je la estonteco de la pacifismo, ĉefe ĉar tiu ĉi neniam reprezentis atentindan forton. Supozeble tiu sinteno kontribuis poste ankaŭ al la fiasko de la Ligo de Nacioj.

Kompreneble, kaj tiel ni alvenas al la antaŭlasta parto de la artikolserio, laŭ Hodler la paca agado devus efektiviĝi paralele kaj samtempe en ĉiuj civilizitaj landoj, por ke ĝi sukcesu, kaj ĝi devus esti tute internacia, *aŭ pli ĝuste supernacia, ne sole laŭ sia celo, sed ankaŭ laŭ sia strukturo kaj laŭ siaj metodoj.* Ĝia programo devus esti sama en ĉiuj landoj, por ke oni povu facile taksu la gravecon de la pacaj progresoj en ĉiu nacio, kaj ĝi devus esti internacie direktata, tiel ke nenia nacia partikularismo havu la eblecon endanĝerigi la unuecon de la metodoj. Kiel ekzemplo: Ne devus ekzisti diferencoj pri la doktrino aŭ pri metodoj inter la pacifismoj franca, germana kaj angla. Por doni al la pacideo novan dinamikon, *vasta populara agado* devus esti lanĉita, tutmonda ligo de ĉiuj pacamikoj devus esti fondita, kompreneble ne sen la starigo de adekvata kapitalfondaĵo, kaj ne sen la ekzisto de forta amaskomunikilo en formo de gazeto.

En sia fina konkluda artikolo de la 5a de februaro 1917 Hodler pledis, por ke preta elito ne nur parolu pri la grandioza tasko de la starigo de la monda federacio, sed konkrete realigu ĝin. La pacifista edukado ne sole restu teoria, sed fariĝu praktika, kaj ankaŭ la nura raportado en la ĉiutaga ĵurnalaro ne sufiĉus. Urĝe necesus plioftigi la korespondadon kaj la personajn rilatojn inter diverslandanoj, ekzemple per la aranĝado de studvojaĝoj al aliaj landoj. Sed sen la ĉesigo de la pasioj inter la nacioj, sen la ekzisto de toleremo inter la popoloj kaj sen la formiĝo de nova pensmaniero, do sen internacia ordo, per kiu la militkaŭzo estos forigita, la situacio ne pliboniĝus.

Konkludoj

Kritikante la ĥaosan situacion, kiu regis en sia vivotempo, kaj la embriana staton de la internacia juro, Hodler estis konvinkita, ke militoj, havante kapitalistan devenon, malaperos, nur kiam estos transformita la socia ordo, kiu ilin naskis kaj kiam la suverenaj ŝtatoj estas subordigitaj al ia supera komuna regularo internacia, kiu antaŭvidas jure devigajn principojn, la rimedojn de la arbitracio kaj la sankciojn por solvi la nepolitikajn internaciajn malkonsentojn.

Hodler kredis, ke la venka milito tute ne plialtigus la ekonomian bonstaton de la popolamasoj mem, sed nur de difinitaj klasoj kaj ke la ideo, ke ŝtato, obeanta al malĝusta ĝenerala doktrino, almilite nur por la ekonomia profito. Sekve, la nacioj estus kune pli fortaj kaj pli prosperaj en la kazo de internacia ordo ol se regas anarkia situacio. La forigo de la almilitemo kaj la respekto al la popolrajto je memekzisto postulus asocion de la nacioj, t.e. interŝtatan organizon.

La federacio limigus la senliman konkuradon, kiu estas la leĝo de la sistemo de la internacia anarkio. Ĉiuj internaciaj demandoj politikaj, ekonomiaj, socialaj, ĉe kiuj la naciaj interesoj ne tute koincidas, ne estus solveblaj antaŭ ol la internacia anarkio ne estos eliminata.

Hodler ankaŭ atentigis, ke la federacio ne estu miskomprenata kiel sinonimo de tutmonda superŝtato. La federacio nur starigus inter la ŝtatoj ian juran ligilon por malhelpi la uzon de la perforto kaj ebligi ilian konstantan kunlaboradon por la komunaj interesoj.

Por la plimulto de la homoj, la federacio estos verŝajne nur io abstrakta, kiu ne tro tuŝas ilian praktikan vivon, sed por ĝiaj protagonistoj kaj pioniroj ĝi reprezentos ion pli altan, ion nefacile analizeblan, ja necesan en ĉiu socia transformiĝo, nome novan idealon, novan senton, novan pensmanieron, laborceladon por generacio, kiu volas rompi la katenojn de premanta pasinteco kaj atingi novajn suprojn. Necesas do, *ke la federacia ideo penetru ĉe la elitojn de la civilizitaj popoloj kaj saturu la mentalecon de iliaj spiritaj kondukantoj. Tiuj elitoj ne konsistos el la hodiaŭaj potenculoj, sed el ĉiuj homoj, riĉaj aŭ malriĉaj, kleraj aŭ malkleraj, humilaj aŭ eminentaj, kiuj estos kapablaj trasenti la noblecon de la idealo de interpopola unuiĝo, kaj al ĝi servadi fidele, humile, pasie, ofereme.*

Per la postulo, ke la principoj de la popolrajtoj devus esti fiksitaj per la internacia juro kaj ke ĉiu popolo devos ricevi la liberan elekton de sia sorto, Hodler - eble surprize por multaj esperantistoj - mem fariĝis teoriisto, pioniro aŭ advokato de la modernaj pacmovado, mondfederalismo kaj internacia juro.

Hodler kiel personeco kaj verkisto

La artikoloj multe malkaŝas pri la personeco, pensmaniero kaj karaktero de Hector Hodler, kunfondinto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), mem. Pro tio liaj tekstoj apartenas, apud tiuj de lia kolego respektive amiko Edmond Privat (1889-1962), al la klasikajoj de la Esperanto-literaturo aŭ -publico.

Mirindaj estas la faka kono, logiko, lingvaĵo kaj vizia antaŭpensado de la aŭtoro renkonteblaj en tiuj trafaj artikoloj, kiuj en multaj rilatoj ne perdis sian aktualecon, ĉar eĉ en la 21a jarcento la homaro daŭre militas, fakte pro la samaj principoj kiel cent jarojn antaŭe, kiujn Hector Hodler analizis en la dekkvara artikolo; oni pensu nur ekzemple pri Usono, kiu kondukas laŭdire justan militon kun siaj aliancanoj en Irako kaj Afganio (kaj tion volus verŝajne fari ankaŭ en Irano, Sirio kaj aliaj landoj, uzante la pretekston de la *islam-terorisma danĝero*) ĝuste pro sia fanatika ideologia misiemo (supozeble ĉefe por defendi geostrategiajn poziciojn kaj por apogi la militekonomion).

La skriba esprimstilo, la Esperanto-lingvaĵo de Hodler estas glata, senmakula, estetike ĝuinda. Nu, hodiaŭ oni dirus *rezulto* anstataŭ *rezultato*, *neceso* anstataŭ *neceseco*, *civilizo* anstataŭ *civilizacio*, *protektismo* anstataŭ *protekcionismo*, ktp., sed tio ne gravas, eĉ havigas al la teksto specon de arkaika etoso siatempa. Iom bedaŭrinde estas, ke Hodler ne indikis bibliografion, por ke oni eksci la titolojn de la libroj kaj revuoj, kiujn li konsultis.

En Universala Esperanto-Asocio (UEA) Hector Hodler vidis la modelon por la internacia solidareco, kiel ĝi estis praktikata dum la milito. Antaŭvidante la pliakriĝon de la klasbatalo kaj de la nacia vanteco, Hodler vidis en la esperantistaro *la embrion de tiuj elitoj*, pri kiuj li parolis kaj kiujn trafis la destino super la naciaj ruinoj konstrui novan, internacian domon. Kvankam Hodler kelkfoje mem estis forlasita de la kuraĝo, montrante ankaŭ dubojn, li direktis akran, preskaŭ sarkasman kritikon al tiuj movadaj gvidantoj, kiuj mem ne tro kredis je la sukceso de la nova organizo UEA.

La personaj trajtoj de Hector Hodler estis trafe vidataj kaj komprenataj de tri el liaj ĉefkolegoj, kun kiuj li kunlaboris. Hans Jakob raportis pri la personeco de Hodler jene: *Hodler (...) unuigis en si artiston kaj homon praktikan. Li estis altkreska, kun nigra barbo, (...) kun aspekto serioza, malofte ridanta, kelkfoje sarkasma, precizema kaj tolerema. Liaj specifaj kvalitoj estis tiuj de ĵurnalisto: li posedis la talenton prezenti komplikajn problemojn en komprenebla maniero. Kaj Eduard Stettler estis konvinkita, ke je la fino de sia mallonga vivo Hodler estus povinta taŭge plenumi oficon de privat-docento por siaj aferoj, ĉar ne nur li inteligente legis amason da gazetoj kaj revuoj, sed kiel abonanto al diversaj bibliotekoj li trastudis multajn volumojn pri historio, ŝtataj aferoj, socia agado, psikologio ktp.* Do, Hodler estis bone informita pri la eventoj kaj problemoj de

sia tempo. Edmond Privat rimarkigis pri Hodler en sia *Historio de la lingvo Esperanto*, ĉapitro pri la fondo de UEA: *Silentema, tre sendependa kaj aŭtoritate persistema, li sin donis tute al tiu elektita laboro kaj preferis vivi malriĉe ol ĝin forlasi*. La meritojn de Hodler kaj ties publico Stettler do povis resumi per jenaj frazoj: *Mi ne kredas trograndigi dirante, ke la merito de Hodler konsistis en tio, ke li sciis kunigi sub unu tegmento la diversajn proponojn kaj provojn de praktika agado; ke per siaj belaj artikoloj li vekis la energion de la esperantistoj; kaj ke li donis al tiu nova organizo altan celon: Krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj*.

Hodler en la kunteksto de Zamenhof, Forel kaj Privat

La signifa pacifista kaj mondfederista kvaropo inter la esperantistaro, kiu postlasis la esencajn kaj konkretajn mesaĝojn kun politika karaktero en la strebado unuigi la homaron, kiuj kompletigis, fruktigis kaj pluevoluigis unuj la alian, nomiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), Auguste Forel (1848-1931), Hector Hodler (1887-1920) kaj Edmond Privat (1889-1962). Oni povas nomi ilin la esperantistaj ĉefteoriistoj pri la paco kaj milito kaj pri la mondfederismo. Zamenhof lanĉis la lingvon Esperanto, la homaranismon kaj formulis pacifistajn ideojn kaj postulojn precipe en siaj dumkongresaj paroladoj, precipe Bulonja (1905) kaj Ĝeneva (1906), kaj en siaj traktaĵoj *Gentoj kaj Lingvo Internacia* de 1911 kaj precipe *Post la Granda Milito* el la jaro 1915, en kiu li sugestis al la diplomatoj la starigon de *Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo*.⁵ La kuracisto-psikiatro Forel estis socia kaj politika aganto, kiu estis engaĝita kiel reformisto de la juro, de la federalisma sistemo kaj de la pacaktivado. Kiel Hector Hodler, ankaŭ Forel pledis por la internacia juro kaj interpopola paco anstataŭ interŝtata milito, por la malarmado anstataŭ armado, por la unuiĝo de la nacioj anstataŭ naciaj antagonismoj kaj ŝovinismo, por la egalrajta internacia libera komerco anstataŭ baroj per dogano; li esprimiĝis favore al la samaj rajtoj por la kolonioj kaj ties homoj anstataŭ ilia ekspluatado fare de la koloniistoj. En 1914/15 aperis lia kulturprogramo sub la titolo *La Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo*.⁶ En tiu sama spirito sekvis do la gazetartikoloj de Hector Hodler, kiuj estis prezentitaj al la legantoj de *Esperanto*. Per sia artikolaro Hodler, kiu ideo anticipis la starigon de la Ligo de Nacioj en 1919, deziris atentigi pri diversaj aspektoj de la pacproblemo kaj alvoki la akcelon de la starigo de pli bona ordo internacia, kiu malebligus la militojn kaj malfortigus aŭ eĉ abolus la interpopolan malamon. Privat reprenis tiun ĉi temaron en siaj politikaj ĉefverkoj *Interpopola Konduto* (1931) kaj *Federala sperto* (1958).⁷ Dum la dua komparas Usonon, Svislandon kaj la Ligon de Nacioj, *Interpopola*

Konduo enhavas lian provon analizi la genezon de la malamo kaj militemo inter la popoloj, akre kritikante la vantecon de la gentoj, la sovaĝecon de la militantaj civilizoj, la hipokritecon de la diplomatoj kaj la nesincerecon en la interŝtataj rilatoj. Li atentigis pri la malmoraleco en la politika kaj armea praktikoj kaj skurĝis la ekscesojn rezultantajn el la pasio kaj venĝo en la nomo de la *nacia religio*, kiel Privat nomis la troigitan patriotismon aŭ naciismon. Ĉi tiuj verkistoj celis montri, ke Esperanto aŭ la esperantismo havas esence pacifistan kernon aŭ karakteron kaj ke ĝi estas konsiderenda kiel projekto de kaj por la paco.

Situacio de la Internacia Juro ĉe la Unua Mondmilito

Kiel bazo de la internacia juro estas konsiderata la verko *De jure belli ac pacis* (Pri la juro de la milito kaj paco) de la nederlanda juristo Hugo Grotius (1583-1645), kiu siavice baziĝis je la verkaĵoj de antaŭaj aŭtoroj. Ĝi aperis en 1825 en Parizo. Liaj teorioj estis pluevoluigataj de Samuel von Pufendorf, Christian Wolff kaj aliaj. La staton de la internacia juro fine de la 18a jarcento resumis Emer de Vattel. Kiel gravaj mejloŝtonoj, konsistigantaj la pozitivan internacian juron, estas konsiderataj ankaŭ la Vestfalia Paco de 1648 kaj la Paco de Utreĥto (1713). En la 19a jarcento estis subskribita tuta aro da packontraktoj, kiel la Vienaj Kongresaktoj kaj la Sankta Alianco de 1815, la Pariza Paco de 1856, la Ĝeneva Konvencio de 1864, la Hagaj Packonferencoj de 1899 kaj 1907, al kiuj Hodler referencas en partoj 1, 3, 7, 13 kaj 16 de sia artikolaro, kaj aliaj. La fondo de la Ligo de Nacioj en 1919 kreis la bazon por la pluevoluigo kaj apliko de la internacia juro. La malpermeso de la perforto ŝajnis tiutempe tiom realec-fremda kaj iluzia afero, tiel ke tiu aspekto de la internacia juro estis unuafoje traktita nur en la Briand-Kellog-Pakto, kiu proskribis la militon nur longe post la fino de la unua mondmilito (nome en 1928). Antaŭ tiu kontrakto, kiu estis subskribita en Londono unue de 11, poste de ankoraŭ kvar ŝtatoj, validis sole la principo limigi la kruelaĵojn kaj protekti la civilulojn. Sed la nomita pakto ne vere servis por proskribi la militon. La subskribintoj sole deklaris, ke ili estonte volas pace solvi siajn konfliktojn. La al milito (aŭ militatako) estis proklamita kiel kontraŭa al la internacia juro. La *Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj*, kiu estis publikigita en 1945, superis la nuran militmalpermeson ankritan en la Briand-Kellog-Pakto, postulante la ĝeneralan malpermeson de la perforto. Per tio ne nur la milito fariĝis kontraŭleĝa, sed ĉia uzado de la perforto en la internaciaj rilatoj iĝis konsiderataj kiel ago direktita kontraŭ la internacia juro. Krom la tiel nomata pozitiva internacia juro ekzistas ankaŭ la Humana Internacia Juro, kiu estis enkondukita en 1864 per la unua Ĝeneva Konvencio pri la mildigo de la sorto de la vunditaj soldatoj de la armeoj

sur la batalkampo. Sugestita ĝi estis de Henri Dunant (1828-1910) sub la impreso de la batalo de Solferino (1859) sude de la Lago de Garda (Italio), en kiu pereis 6000 soldatoj kaj vundiĝis 30000-40000. Sekve estis starigita, en 1863, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (IKRK). Post la Ligo de Nacioj, establita en 1919 kaj malfondita en 1946, la diversaj packontraktoj de la unua kaj dua mondmilitoj kaj la starigo de Unuiĝintaj Nacioj, estis publikigita la *Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj* de 1948 kiel kulmino de tiu pacprocezo. Mortinte tro frue en 1920, Hector Hodler bedaŭrinde ne plu travivis tiujn momentojn.⁸

Kaj la unua mondmilito ne sufiĉis, devis sekvi la dua... Nur poste la homaro raciigis, espereble.

Notoj

¹ Biografian skizon pri Hector Hodler vd. Andreas Künzli: *Universalaj Lingvoj en Svislando. Svisa Enciklopedio Planlingva*, La Chaux-de-Fonds 2006, p. 390-399.

² Hector Hodler estis kunlaboranto de diversaj revuoj (*Document du Progrès de d-ro Broda, Coenobium/Lugano, La Feuille/Genève*), kaj li verkis la 380-pagan traktaĵon *L'organisation pacifique des peuples*, kiu restis ne publikigita kaj kiu estas proksima al la ideo de la onta Ligo de Nacioj.

³http://www.bpb.de/publikationen/01P337,0,0,Nationalismus_Imperialismus_Erster-Weltkrieg.html.

⁴ Literaturo (en la germane lingvo) pri la unua mondmilito vd. *Enzyklopädie Erster Weltkrieg* (Enciklopedio de la Unua Mondmilito), eld. Gerhard Hirschfeld, Gerd Krumeich kaj Irina Renz en kunlaboro kun Markus Pöhlmann, Ferdinand Schöningh, Paderborn 2003; Volker R. Berghahn: *Der Erste Weltkrieg* (La Unua Mondmilito). C. H. Beck, München 2003; Janusz Piekalkiewicz: *Der Erste Weltkrieg* (La Unua Mondmilito). Econ Verlag, Düsseldorf, Wien kaj New York, 1988; John Keegan: *Der Erste Weltkrieg. Eine europäische Tragödie* (La Unua Mondmilito. Eŭropa tragedio). Reinbek bei Hamburg 2003 (2a eld.); Wolfgang Michalka (eld.): *Der Erste Weltkrieg. Wirkung-Wahrnehmung-Analyse* (La Unua Mondmilito. Efiko-Percepto-Analizo). Licenca eldono kun permeso al Seehamer Verlag GmbH, Weyarn 1997; Wolfgang J. Mommsen: *Der Erste Weltkrieg - Anfang vom Ende des bürgerlichen Zeitalters* (La Unua Mondmilito - Komenco de la fino por la burĝa epoko), Bonn 2004; Hannes Leidinger: *Der Erste Weltkrieg* (La Unua Mondmilito), UTB 2011; Daniel Marc Segesser: *Der Erste Weltkrieg in globaler Perspektive*, (La Unua Mondmilito en globala perspektivo), Wiesbaden 2010 (2a eld. 2012); Elise Julien: *Der Erste Weltkrieg* (La Unua Mondmilito), Darmstadt 2013.

⁵ Vd. la koncernajn tekstojn en Johann Dietterle (red.): *L. L. Zamenhof. Originala Verkaro*. Leipzig, 1929.

⁶ Auguste Forel, *Die Vereinigten Staaten der Erde. Ein Kulturprogramm* (La Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo. Kulturprogramo), Lausanne 1914/1915.

⁷ Edmond Privat, *Interpopola Konduto*, Budapest 1931, kaj *Federala sperto*, Hago 1958.

⁸ Thomas Burgenthal kaj aliaj, *Grundzüge des Völkerrechts* (Ĉefaj trajtoj de la internacia juro). Heidelberg, 1988.

© Andreas Künzli, lic. phil., Berno (Svislando), oktobro 2013.

(Grava atentigo: La aŭtoro pretendas la kopirajton pri ĉi tiu verkaĵo kiel tuto. Ĝi estas utiligebla de triaj uzantoj nur kun eksplicita skriba permeso fare de A. Künzli. Neaŭtorizita uzo estos raportita al Pro Litteris, Zuriko, kies membro la aŭtoro estas).

Andreas Künzli (nask. 1962) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron ĉe la zurika universitato, kiun li finis en 1992 per la licenciato.

Nur ĉi tiu tekstversio estas la valida, definitiva.